

Tulipo

Tulipoj estas bulbaj staŭdaj plantoj kreskantaj 10–70 centimentrojn alte, kun kelke da vaksaj verdaj folioj kaj grandaj floroj kun korolo el ses petaloj. Ĝi floras dum aprilo. La frukto estas seka kapsulo, kiu havas plurajn platajn disk-formajn semojn. Ĝenerale tulipoj ne havas odoron. Sed se iu floro odoras, preskaŭ ĉiam ĝi estas oranĝkolora – neniu scias kial. Ĝi havas 150 specojn kaj multege da hibridoj. Klaraj belaj farboj de la floro logas abelojn kaj skarabetojn por polenado.

Longe, antaŭ ol vivis homoj sur la tero, antaŭuloj de la tulipoj estiĝis en Tien Ŝan montaro en Kazaĥio. En sekvaj milionoj da jaroj la tulipo disvastiĝis al regiono norde de Himalajo kaj malpli en la direkto de Mediteraneo. Preskaŭ ĉiuj tiuj regionoj apartenis al la Otomana, la turka reĝejo. Pro tio, onidire, tulipo devenas el Turkio. En la 16-a jarcento regis Sultano la Granda super la Otomara reĝejo. Amanto de ĉio, kio kreskis kaj floris, li plej ŝatis tulipojn. La damoj de lia haremo en liaj okuloj tute ne povis konkurencii kun la beleco de tiu floro. La granda favorato estis la nadlotulipo kun tre pintaj petaloj. La eleganta flormodo de la nadlotulipo fakte estas malaperita. Ne nur la sultano ŝategis tulipojn, la tulipo estis vera manio. Metiistoj faris belegajn produktojn kun bildoj de tiu ĉi eleganta floro. Sur hakiloj, vestoj, plank- kaj vandtapiŝoj, vazoj, domoj, mallonge sur ĉiu imageblaĵo.

Por infanoj en Istanbul la printempo ĉiam estis granda aventuro. La sultano tiel fieris pri la tulipoj en ĝardenoj, ke ĉiu povis vidi ilin. Ĝi aspektis, precipe vespere, kiel en fabelo. Tiam la ĝardenoj estis iluminataj per kandeloj fiksitaj sur dorso de testudoj. Ĉie estis penditaj kaĝoj kun kantbirdoj tiel, ke sonis gaja fajfado kaj ĉirpado de papagoj kaj bluaj paruoj. Bestĝardeno kaj floriĝardeno samtempe, festo por infanoj!

Dum varmega seka somero kaj malvarma vintro la tulipo tute ne videblas. Dum naŭ monatoj ĝi kaŝiĝas profunde sub tero, kie veterŝanĝoj ne povas tuŝi ĝin. Sed tuj, kiam printempas kun mildaj temperaturoj, ĝi rapide aperas por belega florado. Kiam eksomeras kaj la vetero por la tulipo iĝas tro varma, ĝi retiriĝas en la grundon.

La plej konata lando, kiu kultivas florbulojn, estas Nederlando. Historio pri kultivado komenciĝis antaŭ kvarcent jaroj. Tulipfloroj estas fortondataj kiam ili estas plej belaj. Tiu senkapigo okazas por eviti, ke la planto donas sian forton al semproduktado anstataŭ bulbokresko. Kiam tulipoj estas tute finflorintaj estas tempo por bulborikolto.

Ekzistas multaj tulipvariaĵoj, ankaŭ Tulipo Esperanto. Por kultivi novan rason oni ekzemple metu polenojn el ruĝa tulipo sur la pistilon de blanka. La idoj de tia krucigado verŝajne floras per ĉiuj koloroj inter ruĝo kaj blanko. Bonŝance oni tiel trovos belan rozkoloran tulipon, sed se oni volas

kultivi novan rason necesas multe da pacienco. Antaŭ ol semo evoluas ĝis floranta bulbo oni devas atendi eĉ ses jarojn.

Bohumila Trzosová